***Komuniko 6: komitato vendrede***

Sukcese pasis en la ĵaŭdo (31an de julio) la Tago de Komunumo (seminario kaj forumo) kaj de Kunordigo (nur forumo). Pri tiuj komunikoj povos sekvi nur post la fermo de la Kongreso.

La tutan vendredan matenon kunsidis la Komitato. Ĝia unua paŝo estis trakto de la Jarraporto 2013, inkluzive de la financaj raportoj pri tiu jaro. Post aldonoj de raporto de TEJO, kaj informoj pri la Diplomoj pri Elstara Arta Agado, la raportoj estas akceptitaj.

La cetero de la tagordo rilatis al estonta agado. Unu post unu estis montritaj la rekomendaroj el la kvar Komitataj Forumoj. La enhavo de tiuj dokumentoj formos la bazon por ĝisdatigi la partojn de la Strategia Plano, kiuj rilatas al la jaro 2014-15. Komitatanoj pledis por rekontrolo pri la grado de plenumo de la rekomendoj, certe en Lillo, sed rete eblos tra la jaro indiki progreson.

La rekomendaro pri Konsciigo temis ĉefe pri pli forta emfazo al daŭripova evoluo en la informado. Pri Kapabligo la ĉefa diskuto rilatis al la loko de la bezonata administranto por la AMO-programo, ĉu ene de la Centra Oficejo ĉu aliloke.  Pri Komunumo temis ĉefe pri la ĉefe pri la jubilea aranĝo 'Montevideo 60'; sed sentiĝis bezono trakti la tutan kulturan kampon, ne nur erojn pri la festado de tiu jubileo. La voĉdono estis prokrastita ĝis alveno de nova teksto, post tio la tuto estas akceptita. Pri Kunordigo rilatis al eblo ŝanĝi la Statuton cele al starigo de novaj membro-kategorioj. Tiu parto inkluzivis trakton de proponata regularo pri reta voĉdonado kaj rilataj modifoj al la komitata regularo. Tiujn erojn pretigis intense laborinta dumkongresa komisiono, surbaze de estrara propono.  Ambaŭ dokumentoj estis akceptitaj senmodife. Oni starigis konstantan komisionon por trakti la teknikajn kaj organizajn aspektojn de la realigo de reta voĉdonado: komisionanoj iĝis Orlando Raola, Francesco Maurelli, Johannes Mueller kaj Sebastian Kirf, kune kun la Direktoro de la CO.

Pro la multeco de retvoĉdonaj diskutoj, necesis longigi la kunsidon je duona horo. Tio permesis akcepton de la spezkonta kaj bilanca buĝetoj por 2015. Buĝetaj taksoj por la Fondaĵoj por 2014 kaj 2015 estas prezentitaj kaj levis demandojn; estis pledo por kohera estrara plano altiri donacojn al la Fondaĵoj.

Plia pledo rilatas al la pli regula tutjara interkomunikado inter la estraro, konsilio kaj komitatanoj. Nova elekto-komisiono estas starigita: la gvidanto estas Ulrich Lins, kun membroj Ileana Schroeder kaj Michael-Boris Mandirola.

Rafael Zerbetto raportis koncize pri la traktado de la kongresa temo tra la semajno kun pluiro al prezento de la kongresa rezolucio. Ĝi estas akceptita, sub kompreno, ke la koncerna komisiono rajtas plue fari revortumetojn, por igi la tekston pli facile tradukebla. Ĝi aperos papere por la publiko en la fermo, eventuale pere de la kongresa kuriero.

Sub ceteraĵoj, la prezidanto anoncas monkolekton lige kun la Solena Fermo por helpi al sudamerikaj studentoj pli facile povi partopreni la trijaran postdiploman kursaron kiuj en Pollando ekos ĉi-sepembre.  Li anoncis la malfacile atingitan decidon pri la Universala Kongreso en 2016 – Nitra, Slovakio. La sekva fizika kunsido de la Komitato okazos ekde 14.00h en Lille, en sabato la 25an de julio, 2015.

La kunsido finiĝis je 12.39h.

Stefan MacGill
Vicprezidanto de UEA
Komisiito de ILEI pri la retkurso 'Esperanto Etape'.